



Esenca meto 'sur spuro de forkapto' en centro




Diag. 25 (Ĝusta kurso, 7-9) Jam metitaj estas kvar 'transvadoj'. Nun, Nigro havas metrajton. {paĝo 208 de la originalo}


Ĉu vi trovis la esencan meton N7 en centro? Prave estas 'minaci' kvar ŝtonojn per B8. Ĉi tiam Nigro 'forkaptas' unu ŝtonon per N9. Sekve,...




Diag. 26 Post kiam Blanko forkaptas kvin ŝtonojn per B1,...



Diag. 27 Nigro 'tranĉas sur spuro de forkapto' per N2. Tio estas rara kazo de 'ŝtonmeti sur spuro de forkapto en centro'. Surprizinda estas ĉi tiu lim-aranĝo.




Diag. 28 Blanko nepre 'sinligas' per B3 kaj Nigro 'forkaptas' unu ŝtonon per N4.



Diag. 29 (Nigra lim-aranĝo) Blanko 'minacas' per B5 kaj Nigro sinligas per B6. Ĉi tiam lim-aranĝo ĉi tie finiĝas.


En la procedo ekde N7 en diagramo 25 ĝis N6 en diagramo 29, Nigro gajnas du kaptitojn. Aliflanke, Blanko gajnas kvin kaptitojn, kaj adiciante 1 poenton de punkton 'a' en diagramo 29, Blanko havas 6 poentojn ĉi tie. Nun, por faciligi la kalkuladon, supozante ke Nigra gajno estus nulo, oni povus taksi, ke ĉi tie nur Blanko havas poentojn, je 4 poentoj.

{paĝo 209 de la originalo}




Diag. 30 (Blanka lim-aranĝo) Aliflanke, kiam Blanko ŝtonmetas B1 {kaptante 4 nigrajn ŝtonojn}, Blanko faras 8 poentojn da teritorio (, ĉar poste bezonas forkapti per B-a).

Resumante, lim-aranĝo 'sur spuro de forkapto' en centro valoras 4 poentojn.




Diag. 31 (Ĝusta kurso) Post Nigro lim-aranĝas en centro, prave por Blanko estas sinligi per B1. Kiom valoras la ŝtonmeto?


{paĝo 210 de la originalo}





Diag. 32 Oni devas kompari kun N1. Ordinare, ĉi tia lim-aranĝo valoras 3 poentojn, adiciante 2 poentojn de la kaptito kaj 1 poenton de punkton 'a'. Tamen en ĉi tiu kazo,...



Diag. 33 Kiam Blanko ŝtonmetas B2, Nigro sinligos per N3 evitante Blankan minacon, kaj Blanko havos eblecon por fari 1 poenton per B4. (Se Blanko ŝtonmetas B1 en diagramo 31, ne havas ĉi tiu eblecon.) Tamen en la procedo en diagramo 33, Blanko perdas metrajton. Kutime oni taksas la eblecon {por Blanko fari 1 poenton} kiel duono. Tial,...



Diag. 34 En la stato, ke Nigro ŝtonmetis , oni taksas ke blanko havas duon poenton ĉe punkto 'a'.

Subtrahante ĉi tion, la ŝtonmeto  taksigas je '2 poentoj kaj duono da diferenco. Kompreneble B1 en diagramo 31 valoras '2 poentojn kaj duonon'.

{paño 211 de la originalo}